

Okdek jaroj de esperanta vivo, 12-a parto
Leo Tolstoj kaj *La Esperantisto*
Claude Gacond, 190-a radioprelego, 1967.05.31 & 1967.06.03

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En 1894 Leo Tolstoj publike esprimis sian interesiĝon pri esperanto. Liaj asertoj pri la internacia lingvo rapide disvastiĝis tra tuta Eŭropo kaj instigis liajn admirantojn eklerni la lingvon de Zamenhof. Aŭdu, kion diris la rusa verkisto :

A.- « [...] *Por tio, ke la homoj komprenu unu alian necesas : aŭ ke ĉiuj lingvoj kuniĝu en unu, aŭ ke ĉiuj homoj posedu ĉiujn lingvojn, aŭ fine (kiel proponas volapukanoj kaj esperantistoj), ke ĉiuj nacioj havu unu internacian facilan lingvon. Tiu lasta propono ŝajnas al mi plej saĝa kaj plej efektivebla. [...] Volapük montriĝis por mi tro komplikita, Esperanto male tre facila, kia ĝi devas esti por ĉiu eŭropano. [...] Oferoj, kiujn farus ĉiu nuna eŭropano por studi ĉi tiun lingvon, estas tiom etaj, kaj sekvoj, kiuj povus veni el tia kolektiva studado, almenaŭ por ĉiuj kristanoj, estus tiom grandaj, ke tiu provo devas fariĝi. [...] Tial – studado de Esperanto kaj ĝia disvastigo estas vere kristaneca afero, kiu helpas al la starigo de la Dia Regno, de tiu afero, kiu restas ĉefa kaj sola celo de la homa vivo. »*

Cl.- Sed la cara registaro ne tre ŝatis vidi stariĝi la de Tolstoj dezirata Dia Regno. Se la lingvo Esperanto havas rilatojn kun la revoluciulo Leo Tolstoj, tiam ĝi estu malpermesata en la Cara Regno !

A.- En *La Esperantisto* aperis komence de 1895 traduko de studo de Tolstoj titolita *Prudento kaj Kredo*. La cara cenzuro ricevis tiel pruvon pri la ligoj ekzistantaj inter la esperantistoj kaj la aŭtoro de *Milito kaj Paco*. Tiam fulmotondre frapis la cenzuro :

Cl.- La gazeto *La Esperantisto* estis malpermesata en Ruslando.

A.- Tiu malpermeso estis mortiga bato por *La Esperantisto*, kiu subite perdis 545 abonantojn, tio en kriza momento. Restis al ĝi nur 172 abonantoj (44 en Germanio, 38 en Francio, 30 en Svedio kaj 60 en la ceteraj landoj) kaj la financa situacio de Zamenhof estis tro necerta por ebligi novan varbkampanjon en la okcidenteŭropaj landoj.

Cl.- La lasta numero de *La Esperantisto* anoncas en aŭgusto 1895 la interrompon de la eldonado. Tiu interrompo estos por ĝi vera morto.

A.- Zamenhof tiam instigas la esperantistojn vivantajn ekster Ruslando fondi aliajn gazetojn. Ni citas lin :

Cl.- « *Plua eldonado de la gazeto al la nuna redaktoro fariĝis absolute ne ebla. Tial ni kun tiu ĉi numero ĉesas eldonadi la gazeton. Ni esperas, ke la esperantistoj eksterlandaj, kiuj ne trovas sin en tia situacio kiel ni, ne lasos fali nian aferon kaj fondos baldaŭ aliajn gazetojn anstataŭ La Esperantisto. »*

A.- Kaj kiel en 1891 la malriĉa okulisto avertas, ke la financaj cirkonstancoj lin devigas malaperi :

Cl.- « *Kun doloro en la koro mi devas por kelka tempo diri al vi adiaŭ, miaj karaj amikoj kaj kunbatalantoj. Kiam la cirkonstancoj pliboniĝos, mi komunikiĝos kun vi denove, Dume mi petas vin alporti vian konfidon kaj helpoj al tiuj amikoj, kiuj fondos aliajn gazetojn por nia afero. Por ne preni sur min moralan respondecon, mi la fondadon de gazetoj al neniuj rekte proponas, sed mi lasas tion al ĉiuj, kiuj deziros kaj povos tion ĉi fari. »*

A.- La morto de *La Esperantisto* kaj la dua adiaŭado de Zamenhof markas etapon en la esperanta historio. La rusa-germana epoko finiĝas.

Okdek jaroj de esperanta vivo, 12-a parto
Leo Tolstoj kaj *La Esperantisto*
Claude Gacond, 190-a radioprelego, 1967.05.31 & 1967.06.03

Cl.- Tiu periodo daŭris ok jarojn kaj multon alportis al nia lingvo. Tiu kunlaboro inter du lingvaj teritorioj tuj garantiis al nia lingvo supernacian spiriton. Se la esperanta stilo ĉerpis sian viglon el imitado al la rusa stilo, la germana kunlaboro malhelpis la slavismojn tro influi la esperantan lingvo-senton.

A.- Inverse la germanismoj ne trovis akceptemon en tiu mondeto pli ol duone slava.

Cl.- Volapük ne havis tiun ŝancon. La germana influo ludis sur ĝin la ĉefan rolon ; pro tio la germanismoj invadis la lingvon de Schleyer, kies vortfarado jam blinde obeis la germanan vortfaradon. La negermanoj neniam sentis sin senĝenaj en la lingvo de la germana prelato.

A.- Pro la dulingva influo rusa-germana ĉiaj idiotismoj, el kiaj lingvoj ili originis, ne hejmis en esperanto. Emo al racia stilistiko forpelis la esprimojn, kiuj estas tro apartaj kaj familiecaj al nura lingvo-grupo.

Cl.- Kiam tamen idiotismo montriĝis necesa, tiam ĝi prenis la formon de nova radiko. Tipas pri tio ekzemple la radikoj **parkere**, **deĵori** inspiritaj el la galicismoj **apprendre par coeur** (lerni per la koro), **être de jour** (esti de la tago). Tiu lasta radiko **deĵori** eniris esperanton tra la rusa lingvo.

A.- Se tiu unua rusa-germana periodo kodigis la esperantan stilon, ĝi samtempe enorme riĉigis nian vortaron. Lingvo, kiu en 1887 kapablis formi proksimume dekmil vortojn helpe de 920 radikoj, ok jarojn poste riĉos je 2'630 radikoj kaj kapablos formi proksimume 27'000 vortojn. La radikaro triobliĝis dum ok jaroj.

Cl.- Kaj la tiamaj esperantistoj ne plendis pri tiu fenomeno. La timo pri neologismoj ne ankoraŭ ekzistis. La lingvo estis en plena ekspansio. Vorta riĉiĝo estis propra bezono al esperanto de la rusa-germana periodo.

A.- La gazeto *La Esperantisto* garantiis kaj koherigis tiun vortriĉiĝon. Kiel skribis Petro Stojan en sia *Bibliografio de Internacia Lingvo* :

Cl.- « *Malriĉa ekstere, la unua gazeto La Esperantisto ne taŭgis kiel propagandilo, sed ĝi servis kiel centro kaj edukilo por la unuaj pioniroj, plenumante rolon de « koresponda perfektiga kurso.* ». *Efektive, la unuaj verkantoj regule legis siajn artikolojn, korektitajn de la majstra mano, kaj tio estis por ili – lernejo de l' esperanta stilo.* »

A.- Tiu konstanta interveno de la mano de Zamenhof ne ebligas havi precizan ideon pri la lingva nivelo de la kunlaborantoj al *La Esperantisto*. Malbonaj artikoloj plenaj da stilaj eraroj transformiĝis tutcerte en ĉefverketojn. La plej bonaj estos represitaj en 1903 en la *Fundamenta Krestomatio*, verko kiu ĉiamigos la influon de la unua esperanta gazeto.

Cl.- Sed se post sepdek jaroj oni povas objekte taksu la rolon de tiu unua gazeto, ni ne forgesu, ke en la jaro 1895, kiam ĝi malaperis, la ĝenerala atmosfero ne estis tre optimisma. Oni eĉ ne konsciis, ke sub la regado de *La Esperantisto* la lingvo tiom organike riĉiĝis. La diskutoj pri reformoj kaj la financaj krizoj tro okupis la spiritojn ; pro tio la vera lingva fenomeno de tiu periodo restis kaŝita al la okuloj de la tiamuloj.

A.- Nur Zamenhof, kiu estis korektinta tiom da mallertaj verkprovoj, konsciis pri la didaktika rolo de *La Esperantisto*. Pro tio li dufoje kondukis sian familion en mizeron por provi savi el pereco tiun necesigan organon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-